



PENSEO

N-ro 152

junio/2004

Monata Beletro Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 15-a jaro <http://www.elerno.net/penseo.htm>

Luko

Maodun*



Sur la fasado de vilaĝa domo estas nur vico da fenestroj el latoj. En varmaj kaj serenaj tagoj, la fenestroklapoj sin apertas ĉiuj en la plena larĝo kaj ekestas sunradioj kaj aerfluo.

En la tagoj ventegaj, pluvegaj aŭ vintraj kun forta hurlado de la norda vento, la lignofenestroj estas fermitaj kaj tiam en la domo regas malhelo kiel en kelo.

Pro tio vilaĝanoj faras tra la tegmento kvadratan apertureton vitritan kaj nomatan lukon.

Somere, kiam ekpluvego verŝiĝas, knaboj plej preferas kuri kaj sin amuzi en la pluvo, kun la kapo levita rigardante al fulmoj. Sed iliaj gepatroj obstine malpermesas. "Endomiĝu!" Kun la fermiĝo de la fenestroj la knoj estas enfermitaj en la obskure keleca domo. Tiam la luketo fariĝas al ili ununura konsolo.

Tra la vitreto vi povas vidi, ke tie dancetas pluvogutoj plaŭdantaj kaj ekbrilas fulmoj rubandosimilaj; kaj el tio vi povas imagi al vi, kiel forte forbalaas la mondon la pluvo, vento, tondro kaj fulmoj, kaj ke eĉ pli multoble granda estas ilia potenco ol tiu, kiun vi efektive sentas sub la libera ĉielo. Tiu ĉi malgranda luketo povas inspiri vian imagon!

Nokte, kiam vi estas devigata "ripozi" en la lito, supozeble, vi ankoraŭ memoras la herbejon kaj riverbordon sub la lunlumo, kaj vi ŝovas vian kapon el le kulvualo por

suprenrigardi. En tiu ĉi momento la luketo denove farigxas al vi ununura konsolo!

Via imago povas vagadi de unu stelo, unu nuboj super la vitrita luketo al miriada da flagretantaj steloj amindaj, fascinaj nuboj similaj al montoj, ĉevaloj kaj gigantoj; kaj de silueta strio preterŝoviĝinta super la vitrita luketo al griza vesperto, kantscipovanta najtingalo aŭ tirana strigo --- Unuvorte, tuj eksterniĝos en via imago ĉio de la mirinde ĉarma mondo nokta.

Ajojojo! Kiom mirinda estas tiu ĉi malgranda malplenaĵo! Ĝi vidigas al vi kosman sekreton, pri kiu vi neniel revus, se ĝi ne ekzistus, ĝi imagigas al vi diversajn okazaĵojn, kiujn vi neniam imagos al vi, se ĝi ne ekzistus!

Grandan dankon meritas la plenkreskuloj, kiuj eltrovis tian "luketo". Ĉar la viglamensaj knaboj kapablas bone scii, kiel trovi "havecon", "plenecon" el "malpleneco", eĉ pli vaste, pli komplike kaj pli aŭtentike ol propraokule ili vidas.

elĉinigi **Xiong Linping**

* Maodun (1896-1981), pseŭdonimo de Shen Dehong, ĉina fama verkisto.

Pordofrapoj

Maodun

Pum, pum, pum!

Mi vekigis salte el la sonĝo.

Kiu frapis je mia pordo? Mi pensis konfuzite. Mi streĉis mian orelon por aŭskulti. Frapsono jam malaperis. La lampo surkape disverŝis iom da helflava lumo sur mian dormeman vizaĝon. La fenestroj gluitaj per papero kaj litvualo restis tiel kvietaj kiel

antaŭe.

Turninte sur alian flankon, mi estis apenaŭ dormeme revenonta en la songon, kiam la frapsono min vekis ankoraŭfoje. La frapadon superonis hurlado. Ĉu la norda vento muĝas aŭ homoj vokas por vekí? Mi ne povis fari decidon. Tamen mia sango ekbolis. Kvazaŭ mi jam elflugis el la ĉambro kaj tranĉis la ĉielon, rajdante sur la nuko de la norda vento!

La surdiga hurlado tamen obtuziĝis, mallaŭtiĝis kaj fine malaperis. Tio, kio restiĝis, transformiĝis en solecan malplenen.

Ĝuste tia malpleno ekestigis tia laŭtan hurladon! Mi ekridis, kompreninte ke mi estis trompita de halucinacino.

Kun rondigitaj okuloj mi volviĝis en profundaj pensoj. Multaj vizaĝoj dancis unuj post aliaj antaŭ miaj okuloj; multe da voĉoj bruis laŭte aŭ mallaŭte ĉe miaj oreloj. Abrupte ĉio pereis. La mallaŭta frapsono persiste albloviĝis el la fenestroj, kvazaŭ iu frapus je la pordo.

“Kiu vi estas? Kio okazis?” Mi malpacience krie demandis, sed ne venis respondo.

Mi malŝaltis la lampon. Ekster la fenestroj sporade glimis kelkaj steloj sur la frosta kaj malhele blua ĉielo. Ne povis esti, ke iu frapas je la pordo en tiel profunda meznokto. Se vere estas homo, mi pensis, li certe estas malĝentila ulo, kiu vekas aliulon per pordfrapado, sed ne donas respondon.

Mian kontempladon interrompis la tondrosimila bruo ekster la pordo. Nature tio ne estis la bruo de Moskita svarmo. Kvankam ili vere ekzistis, ili, kaŝante sin en mallumaj anguloj, tamen jam perdis la forton por ekestigi bruan tondron. Tio ne estis vera tondro, mi komprenis, ĉar estis ankoraŭ tre frue por tondra sezono.

Mi turnis sur alian flankon sub la litovrilo kaj premis mian maldekstran oreilon sur la kapkusenon, suspektante, ke la bruo memproduktiĝas en miaj propraj oreloj. Tamen, subite sonis ankoraŭfoje pum, pum,

pum!

La triafoja frapsonado disfuziĝis en la frida aero, tre sonore kaj triste. Neniel ĝin eltenante, mi saltis el la lito kaj tirmalfermis la pordon por pririgardi eksteren.

Sin trovis nenio. La lunarko super la lageto antaŭdoma disverŝis malvarmetan lumeton; vico da ĉerizarboj ĉe la lageto, nudaj en la glaciĝinta aero, tremetis leĝere.

Sin trovis nenio, krom nigra hundo, kiu kuŝis surventre ĉe la pordo, kun kapo flanken klinita, kvazaŭ subaŭskultante, kaj nun klininte sian kapon hontŝajne, malrapideme iris sub la plankon antaŭ la tegmentrando kaj kuntiriĝis en bulon kun sia buŝegon en haraĵan kolon.

Mi naskis portempan kompaton al tiu griza besto, kvankam en mia menso fulmis riproĉeto: Estas ĉi bojemulo, kiu petolaĉe vekis homon, sed postlasis malplenen al li.



elĉinigi **Vejdo**

Poemoj de Xi Murong

* Xi Murong (1943-): tajvana poetino



Floranta Arbo

kiele renkontigi vin jen kun mi
en la momento kiam mi plej
belas

por tion realigi
mi preĝis al Buda' jam kvin cent jarojn
por nia amligiĝo
Budao fine ŝanĝis min en arbon
kreskantan ĉe la vojo frekventita de vi

en la sunlumo
diskrete pompas floroj
—sopiroj miaj antaŭvivaj
proksimiĝante

vi aŭskultadu atenteme
folioj tiuj tremetantaj
—atenda vervo mia

vi tamen preterpasis ignorante
la falintaĵojn post vi
amik’
ah, tiuj estas ne petaloj
sed mia koro velkiĝinta

Elektio

se mi venus al la mondo
nur por unufoja renkontiĝo kun vi
nur por la momento en dek mil lumjaroj
por la dolĉon, triston de l’ momento ĝui

do, ĉi ĉi’ okazu
prezentiĝu dum momento
kapklina danku mi al ĉiuj steloj pro la helpo
por ke mi kaj vi renkontiĝu
kaj jen disiĝu
laŭ la poem’ far Dio
kaj maljuniĝu malrapide

Kredo

mi kredas ke l’ esenc’ de amo
egalas al pureco kaj mildec’ de vivo
mi kredas jen al ĉiu
reflekt’ kaj intersend’ de lum’ kaj ombro

mi kredas ke la floroj kovrantaj l’ arbon
nur originas el la semo sola en glaciĝo
mi kredas ke en tri cent poemoj
tio, kio prezentiĝas ripetfoje
’stas l’ ununura vorto, kiun
ne elbuŝigis oni en juneco

mi kredas ĉion aranĝitan de l’ Ĉielo
mi ankaŭ kredas, ke se vi volontos
postsekvi l’ distan fonton de humilo
finfine ni interkomprenos



Kial

mi povas ŝlosi mian plumon. kial
ne povi ŝlosi amon kaj ĉagrenon

dum longa vivo, kial
ĉiam ĝoj’ velkiĝas ĉe apero
la plej bela temp’ forpasas plej rapide

Sopiro

fakte tio, kion mi sopiras
’stas nur tiu momenteto
mi neniam vin postulis
doni al mi vian tutan vivon

se ni renkontiĝi sur la montalio
plena je disfloraj gardenioj, se ni
havas amon ardan foje antaŭ ol disiĝi
kiom ajn, do, longa vivo
estas nur nenio alia ol
la momento kurta
en rememoro nia



Adiaŭado

ne ĉiuj sonĝoj jen sukcesas realiĝi
ne ĉiuj vortoj eblas aldiriti al vi
kaj memriproĉo kaj repento
profunde ĉiam plantiĝas en kore post forlaso
via

laŭdire ĉiaj amvarioj en la mondo
finfine, aj, malplenos
mi tamen penas tion perdi

kontraŭe tion ĉiam mi faradas
mistrati jam morgaŭon disflorantan
kaj eble la hodiaŭon

hodiaŭ ripetigis la disiĝo sama
nekonatoj ni fariĝos poste
jen malproksime je mil lioj*
en la krepusk’ vespera
profunde mi la kapon klinos al vi

